


# TEA-BULTENO

**15A JARO** **MAJO - JUNIO 2012** **NUMEROJ 5-6**

Propra lingvo estas la arkivo, kiu entenas spertojn, konojn kaj kredojn de ties komunumo.
*Fernando Lázaro Carreter (filologo k ĵurnalisto - 1923-2004)*

## Kara Legantaro!

Jes, jes, mi estas aŭdanta vian malican komenton, pro la fakto ke ĉifoje TEA-Bulteno malrespektis sian pli-malpli kutime akuratan aperon, sed mi havas tre trafan pretekston, t.e. la kunorganizadon de la Eŭropa Konferenco, finiĝintan antaŭ deko da tagoj. En la lastaj semajnoj, antaŭ kaj dume, tute ne estis tempo por pensi pri io alia, jen la kialo! Se vi ne havis eblon ĝin ĉeesti, mi ja sugestas, interrete, legi ekz. artikolon ĉe "Libera Folio" aŭ tiun aperintan en la junia ESPERANTO de UEA. En ambaŭ, sufiĉe detale oni informas pri la okazaĵo, tial mi ne ĝenas vin per regurdado de pli-malpli samaj priskriboj, klarigoj kaj komentoj. Fine ne decas al kiuj estis plene engaĝitaj en tiu aranĝado, laŭdi propran faradon. Ekzistas fakte Zamenhofa proverbo, kiu tre efike priskribas tion: "kiu mem sin gloras, malbone odoras". Sed ion aparte signifan mi ŝatas mencii, nome la tre gravan rekonon al tiu ĉi konferenco: TEA, tra sia prezidanto Edvige Ackermann, ricevis de la Itala Prezidento Giorgio Napolitano, medalon, ties Reprezentan Premion.

Kaj nun, kelkvorte, pri la aranĝo. La tuta projekto, ellaborita de Eŭropa Esperanto-Unio kaj aprobita en 2011 de Programo 'Eŭropo por Civitanoj' (de EU), estis fine realigita en Triesto, 9an-11-an de majo. Eminentaj politikistoj, ekonomikistoj kaj aliaj fakuloj prelegis kaj diskutigis pri la temo: "Kia estus Eŭropo nun, se ne ekzistus EU?", prezentante siajn vidpunktojn kaj ĉefe siajn spertojn ene de EU. Ĉio ĉi vekis grandan interesiĝon inter la junaj universitataj studentoj pri ĵurnalismo kaj la pliaĝa publiko, ĉi-lasta ja vivinta la diversajn momentojn de naskiĝo kaj plua evoluo de la Unio. Inter la publiko, estis pluraj esperantistoj kiuj, atente kaj aktive, sekvis la tri-tagan konferencon, malgraŭ la deviga uzado de aŭskultiloj, kio kutime tre strangas ĉe samideanaro. Sed certe ili estis tre entuziasmigitaj (nur enkore, ĉar neniu manifestis tion malkaŝe!) pri la eldiraĵo de la eksa prezidento de Kroatio, Stjepan Mesić, kiu fine de sia prelego esprimis sian esperon, ke la internacia lingvo trovu sian lokon ene de estonta EU.

Kio tamen ankoraŭ substrekindas el la tuta evento? Jes, certe la veno de tiom da gravaj kaj eminentaj personoj, ĉu eksterlandaj ĉu italaj, konsiderintaj inda la partoprenon en tia konferenco, la ĉeesto de junularo el diversaj landoj kaj lingvoj, la atento de la amaskomunikiloj, kaj ĵurnalaj kaj televidaj, sed mi ŝatas altiri vian atenton al la fakto, ke dum la tuta aranĝo funkciis tri laborlingvoj: angla, itala kaj Esperanto! Ĉi-lasta, samranga kiel la aliaj du partneraj lingvoj, ludis perfekte sian rolon de ponto-lingvo, rompante senbrue sed tre efike la barilojn antaŭmetitajn de la lingva diverseco. Kaj kion diri pri la interpretistoj? Dum tiu grava konferenco, oni ne parolis pri "Kiel vi fartas, amiko?" aŭ "Kion vi manĝos ĉi-vespere?", sed pri temoj kiaj politiko, ekonomio, historio kaj homaj rajtoj, kiujn la prelegantoj disvolvis foje per tre teknika terminaro; foje ili eligis siajn pensojn en tre komplika maniero, tiom ke eĉ en propra nacia lingvo, malfacilis sekvi la enhavan fadenon. Ĉiel ajn la lertaj interpretistoj (entute ili estis 7, el kiuj 5 esperantistaj) elturniĝis tiel elegante, tiel flue, tiel fajntraduke, ke tondran aplaŭdon ili meritas pro sia streĉega laborado. Ĉiujn prelegojn mi sekvis, tra la aŭskultiloj, en la internacia lingvo, eĉ kiam la prelegantо estis parolanta itale, tial 100-procente mi povas aserti, ke Esperanto tre bone kaj klare funkciis! Kiel sciate, esperant-istoj dum siaj aranĝoj tute ne bezonas interpretadon, kiel okazis dum ĉi Eŭropa Konferenco, ni ja kutimas al senpera aŭskultado kaj parolado, sed por mi temis pri nekompareble interesa sperto, kiu eĉ pli instigas min al plua agado por dis-vastigo, propagando - en ĉia medio - de tiu ĉi nia mirinda solvo por la tuthomara interkomunikado, grava instrumento por gardi la diversecon kaj la kulturan kaj lingvan riĉecojn ene de la Eŭropa Unio.

Spite al ĉio!

*Via Redaktanto*

## Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Jen du novaj demandoj, por testi vian konon pri via urbo!

1) Per kiuj imagriĉaj nomoj la popolanoj baptis la urbodomon, konstruitan en 1875 laŭ projekto de la triesta arkitekto *Giuseppe Bruni*?
2) Kiel nomiĝas la fontano, situanta antaŭ la urbodomo, starigita "honore al florado de la urbo kaj, kiel akvofonto, por la civitanaro kaj vizitantoj" kaj kial ĉe ties lateroj estas reprezentitaj nur 4 kontinentoj?

Bonan amuziĝon kaj ... kleriĝon! *(respondoj je la 5-a paĝo)*

# Komenco Aprila – trompo facila.

( Z. 23)


Ĉu vi trapasis sendamaĝe tiun unuan tagon de la pasinta aprila monato? Ĉu neniu klopodis vin trompi?

La enviciĝo de tiu ĉi proverbo en la originala Proverbaro Esperanta de Zamenhof (ununura sub la numero 23) iomete instigis min studi pli profunde la temon.

Tiu kutimo kredigi neverajn noticojn aŭ estigi erarigajn iluziojn je la unua tago de la monato aprilo, estas tradicie disvastigata en Eŭropo kaj Ameriko. La ŝerctago, en Hispanio kaj Latinameriko, anstataŭe, okazas je la 28-a de decembro.

Dum la foraj tempoj, kiam la homaro estis pli proksima al la Naturo, enkadre de la kamparana kaj brutbredada mondo de ĉiuj civilizacioj kaj popoloj, je la jarkomenco okazis favorigaj ritoj por simbole celebri la finon de tempociklo kaj propicie bondeziri al la nova. Ĉe la diversaj civilizacioj, kalendaroj malsamas laŭ tempokalkulo, eĉ nuntempe: la "gregoria", kiu anstataŭis la "julia"-n, krome la "islama", la "hebrea", la "hindua", la "ĉina" (kun ĝia tipa ĉiujara besto-nomado). Ankaŭ la epoko de jarkomenco malsamas: kelkaj popoloj ĝin lokigas ĉirkaŭ la vintra solstico – kiam la suno denove ekaltiĝas sur la horizonto kaj, precipe por la iama homaro, forpasis la superstiĉa timego de ĝia entuta malapero; por aliaj ĝi delokiĝas al printempo – kiam la kamparo denove vekiĝas, komence de nova sezono. Ĉijare, la 20-an de marto, granda festa ceremonio okazis en pluraj centraziaj landoj, por la komenco de la jaro 1391, laŭ la "persa" kalendaro, kiun la zoroastra religio enkondukis.

La jarkomenco – vintra aŭ printempa – plurfoje ŝanĝiĝis ĉe la malsamaj popoloj kaj, memore de la printempa tradicio, la 1-a de aprilo restis okazo por mokoj kaj ŝercoj. La dirmaniero "aprila trompo" ĉeestas en ĉiuj ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj supoze ankaŭ en aliaj. En la angla: *All Fools' day* <tago de ĉiuj naivuloj>; france: *poisson d'avril* <fiŝo de aprilo>; germane: *April-scherz* <aprila ŝerco>; ĉarme ĉe hispanoj: *inocentada* <naiveco>; itale: *pesce d'aprile* <fiŝo de aprilo>.




Amuzaj anekdotoj koncernas la rilaton kun "fiŝo". Meze de la 1500-a jaro, la franca reĝo Karolo la naŭa restarigis la oficialan jarkomencon je la 1-a de aprilo prefere al la 1-a de januaro. Do, je la decembra fino okazis la tradicia intersanĝo de bondezirantaj donacoj, sed ŝajne pluraj mokemuloj, malakordiĝantaj kun tia delokado, sendis al la amikoj bondezirajn mesaĝojn kaj malplenajn donacpakaĵojn, je la posta 1-a de aprilo. La suno, dum tiu jarcento, ĉeestis en aprilo ĉe la zodiaka simbolo de "Fiŝoj", kaj pro tio ekestis rilato al fiŝo pri tia trompiga tago.

Alia spritaĵo atribuas eĉ pli fore la nomon. Onidire, je la unua de aprilo de nedifinita jaro, la romia imperiestro Domiciano, estis abrupte kunvokinta la Senatanojn por serioze demandi konsilon pri kuirado de impona rombo-fiŝo. Sufiĉe kredebla konjekto, aparte memoriganta, ke alia romia imperiestro, Kaligulo, nomumis sian ĉevalon … senatano. Historia vero.

Laŭ lingvistiko, eble, la nomorigino estas pli modesta kaj popola: kiel la fiŝo stulte mordas la hokon, kaŝitan per apetitveka logaĵo, tiel naivuloj lasas sin trompi per kredeblaj ŝercoj, precipe kiam serioze kaj zorgeme aranĝitaj.

Ekzemplodona estas unu el la plej malnovaj kaj memorindaj mokoj, kiu, en 1878, ŝoke trafis la florencanojn. En *"Gazzetta d'Italia"* <itala gazeto> estis publikigita sciigo pri abrupta forpaso en Florenco de hinda maharaĝo, kiu, laŭtradicie, estus kremaciota je la 1-a de aprilo, sur alta stiparo alcele konstruota ene de *"Parco delle Cascine"* <parko de farmoj>, fama urboloko. Tie kunvenis ega homamaso, kiu dum pluraj horoj atendis, ĝis kiam el la arbustoj ekaperis aro da junuloj, vestitaj kiel fiŝistoj, krie mokantaj: "Frititaj Arnofiŝoj, frititaj Arnofiŝoj!".

La nuntempa disvastiĝo de amaskomunikiloj plifaciligas la organizon de tiaj aprilaj trompoj.

En 1957, la brita tv-stacio BBC elsendis raportaĵon rilate al mirinde abunda rikolto de spagetoj kulturitaj en la kamparoj de Svislando. Pluraj spektantoj telefonis, por aĉeti kelkajn kilogramojn de tiu specialaĵo.

En 1977, ĉiam en Britio, la tagĵurnalo *"The Guardian"* publikigis suplementon pri tute ne ekzistanta insulo *San Seriffe*: la nomo aludis al *"sans-serif"*, litertipo uzata ĉe presejoj.

Eĉ la ŝerco, en 1938, de *Orson Wells*, kiu el usona radiostacio elsendis kronikon pri "invado de marsanoj" – ege terurigante la tutan aŭskultantaron – estis origine organizita por la 1-a de aprilo, sed poste, pro teknikaj kialoj, prokrastita je la 30-a de oktobro.

Sensacia aprilŝerco ankaŭ ĉijare okazis: la brita agentejo de la aŭtomobilfabriko *Peugeot* tute serioze anoncis lanĉon de speciala versio pri sia modelo "RCZ", kapabla - onidire - ŝanĝi la koloron de karoserio laŭ la emocioj de la stiranto.

Do, dum jaroj kaj eĉ jarcentoj, tiu tradicio tute daŭris per sprita fantazio, ebla reeĥo de bonhumora karnavala etoso, por bonŝance helpi nin elteni la nuntempajn vivsekvojn, ne tro ĝojigajn. Nepre.


***VIGLO***

# Laste trovitaj!

Tie kaj tie serĉante kuriozajn esperantaĵojn, jen mi ekhavis la ŝancon malkaŝi ion vere originalan. Vidu ĉi-sube!

Temas pri du kambioj[1)], la unua kun dato "7ª de aprilo 1916" kaj la dua emisiita je la 30ª de julio 1923. Sur ambaŭ klare legeblas la probabla traktinto: Mercerie du Midi, H. Bastide & C^ie, el Carcassonne, Francujo. Tiel en 1916, dum en 1923 ŝanĝiĝis la nomo de la entrepreno ĉar ĝin eniris ankaŭ la unue-naskita filo Ernest. Kio plej interesis min, kiel kolektemulon, estis la Esperanta simbolo kiu aperas sur la du kambioj.

Bedaŭrinde, nenio alia scieblas: ĉu eble iu havas pliajn koncernajn informojn? Antaŭdankon pro via eventuala helpo!




[1)] Kambio (PIV): Komerca valorpapero, cedebla k negocebla laŭ la komercaj leĝoj k kutimoj sen tribunala aŭ borsa proceduro, k plejofte ĝirebla.

## *EKSPOZICIO KAJ SIMPOZIO EN BAVARA ŜTATA BIBLIOTEKO*

Okaze de la 100^-a datreveno de la morto de Prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912), la aŭtoro de Volapük, kaj la 125-jara ekzisto de Esperanto, Bavara Ŝtata Biblioteko (BŜB) en Munkeno aranĝos ekspozicion kun la titolo *Inter utopio kaj realo: konstruitaj lingvoj en globalizita mondo*. BŜB apartenas al la plej grandaj universalaj bibliotekoj de la mondo kaj posedas unu el la plej riĉaj planlingvaj sortimentoj.

La solena malfermo de la ekspozicio okazos ĵaŭdon, la 14^-an de junio je 19h00 en la biblioteko (Ludwigstrasse 16, Munkeno), fare de d-ro Rolf Griebel, ĝenerala direktoro de BŜB. La biblioteka koruso prezentos kantojn en Volapük kaj Esperanto. Enkonduka referato pritraktos la temon *Kio estas kaj kiucele oni okupiĝas pri interlingvistiko?*

Vendredon, la 15^-an de junio, okazos tuttaga simpozio kun prelegoj de:

- Prof. D-ro Heiner EICHNER, Viena Universitato;
- Reinhard HAUPENTHAL, iama instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko, Universitato de Sarlando;
- D-ro Ulrich LINS, historiisto, Bad Godesberg;
- Mag. Herbert Mayer, gvidanto de E-Muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Biblioteko;

**daŭrigo 6a-paĝe** ⟶

## Poŝtmarkoj

Por omaĝi la 125^-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto kaj reklami la lingvon, UEA mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL poŝtmarkon kun la jubilea emblemo desegnita de la brita esperantisto Peter Oliver. Ĝi validas por afranki unuaklasan leteron ĝis 20 gr por enlanda uzado.




La nova nederlanda marko estis eldonita sojle de la Malferma Tago de la Centra Oficejo (28 aprilo), kaj estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA, en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas € 6,00 (plus afranko).

La poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto estas la kvina laŭ mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko certe spertos la samon. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93^-a UK en Roterdamo kaj la 100^-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblaj estas tiuj pri la 150^-a datreveno de L.L. Zamenhof kaj la 100^-a datreveno de Ivo Lapenna, ambaŭ eldonitaj en 2009. Ankaŭ ili estas vendataj en blokoj de 10 markoj (EUR 5,50 por bloko).




Jam en marto tiu jubilea simbolo aperis sur poŝtmarko mendita de Finna Esperanto-Asocio. Kromajn informojn pri ĝi donas eafmendoj@esperanto.fi. Ĝin produktis la duonŝtata firmao Itella (Finna Poŝto) kaj la valoro de tiu unuaklasa poŝtmarko egalas al 0,75 €.

Antaŭ kelke da tagoj, el tiu lando, alvenis letero, sur kies koverto estis la jena, eble ĵus bakita, poŝtmarko. Bedaŭrindas ke ĝi estis produktita et-kvante, nur en 40 pecoj. Ĉiam unuaklasa, do uzebla por sendo al eksterlando. Tre ĉarma la bildo, kvankam eble ne tiom klara por neesperantistoj.




Pli kaj pli fariĝas komplike por filatelistoj-esperantistoj katalogi la tiel diritajn "individuajn" aŭ "personigitajn" poŝtmarkojn je Esperanto-temo. Neniu tiom zorgas pri sufiĉe vasta informado, disanoncante pri ĵus aperigita marko (kiel ekz. prave faras UEA), kvazaŭ oni intence dezirus tion kaŝi al interesatoj. ELF-AREK, Esperanto-Ligo Filatelista, ricevas informojn pri nove produktitaj poŝtmarkoj nur hazarde, aŭ danke al siaj membroj, kiuj, estante mem la iniciatintoj, pli ol iu ajn havas intereson disanonci pri lastaj produktaĵoj. Kaj la samo okazas pri glumarkoj, kiuj hodiaŭ eĉ pli facile kaj malmultekoste farigeblas. Kiel domaĝe ke plejmulte da esperantistoj neglektas informi la Ligon, kiam aperas tia (aŭ ia ajn) esperantaĵo kaj plie, ke malmultaj komprenas, ke eĉ tiaj "stultaj" paperpecetoj estas gravaj por la historio de nia movado. En la E-Muzeo de Vieno oni gardas ĵaluze eĉ la glumarkojn, kiuj, tre kreive kaj trafe (ni konsideru ĉefe tiujn aperintajn eke de pasinta jc), bildigis la pensojn kaj spiriton de la pioniraj esperantistoj, surpaperigante, foje tre naive sed ĉiam sincere, la fundamentajn valorojn de Esperanto, pri kiuj oni estis pasie konvinkita.

## PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Jen la lasta listo de paronimoj de VIGLO: li kaj mi aparte atendas scivoleme viajn komentojn pri la diversaj, jam aperintaj, paronimoj. Ĉu tiuj ĉi - viaopinie - utilas?*

***Galeaso*** granda galero
***Galeo*** tabuleto por kompostitaj linioj en tipografio
***Galero*** antikva remŝipo
***Galerio*** artaĵsalono, artaĵkolekto ks
***Galio*** *(Bo)* sp. de rubiacoj; ĥemia elemento
***Galiono*** mezepoka granda ŝipo
***Galo*** sekreciaĵo de hepato

***Ganto*** manvesto
***Gento*** tribaro

***Garantianto*** tiu, kiu garantias
***Garantiulo*** ostaĝo

***Gardo*** ago gardi; gardostarantoj
***Gvardio*** militista, regnestra gardotaĉmento

***Gemo*** multekosta juvelŝtono
***Geno*** kromosoma elemento
***Ĝemo*** plorplendo
***Ĝeno*** ĝenado, ĝenaĵo

***Generalo*** ĉefoficiro
***Ĝenerala*** rilatanta al tuto

***Glaco*** spegulvitro
***Glaceo*** brila aspekto de glaceaj substancoj
***Glaciaĵo*** sukeraĵo el glaciigita kremo
***Glacio*** akvo solidiĝinta pro malvarmo
***Glaciso*** ekstera deklivaĵo de fortikaĵo
***Glaĉero*** glacirivero

***Gnomo*** minejkoboldo
***Gnomono*** montrilo de sunhorloĝo

***Grado*** graduso; honorŝtupo ktp
***Krado*** ferstangeta barilaro ks

***Grajlo*** hajlospeco
***Grano*** semero; malgranda globa objekto
***Greno*** planto kies grajnoj estas mueleblaj

***Granato*** *(Bo)* multgrajna frukto de granatujo
***Granito*** grajna malglata rokaĵo
***Grenado*** speco de malgranda bombo
***Grenato*** juvelŝtono

***Graplo*** multebraka ankreto
***Grapolo*** spiko, beraro

***Grejso*** rokospeco; sabloŝtono
***Greso*** *(Bo)* gramineo uzata kiel furaĝo

***Grifo*** fabela rabobirdo
***Grifelo*** gravurilo; ardezkrajono
***Grifono*** (Zo) hundospeco - (la birdospeco, itale nomata '*grifone',* estas en E-o: **ansergrifo**)

***Groco*** dekduo da dekduoj
***Groso*** *(Bo)* frukto de grosujo *(fam, Grossulariaceae - itale: **grossularia**)*
***Groŝo*** aŭstra aŭ germana monero
***Groto*** malvasta kaverno

***Gudro*** karbopeĉo
***Gurdo*** portebla organeto

***Ĝibo*** dorsa nenormala elstaraĵo
***Ĵibo*** triangula velo

***Ĝoji*** senti plezuron en la koro, esti gaja
***Ĝui*** sentadi plezuron en io

***Ĝusta*** konforma al la regulo
***Justa*** konforma al la juro

***Halo*** ĉambrego
***Haloo*** *(As)* lumringo de astroj

***Harpio*** fabela monstro; *(Zo)* sudamerika rabobirdo; malpacema virino
***Harpo*** muzika kordinstrumento
***Harpuno*** sagforma lanco por fiŝkaptado

***Haŭsero*** fortika ŝnuro por fiksi ŝipon ĉe kajo
***Haŭsiero*** basiero; spekulacianto pri prezoj ks

***Heliantemo*** *(Bo)* genro de tufarbusto (*Helianthemum* el cistacoj)
***Helianto*** *(Bo)* sunfloro (*Helianthus* el asteracoj)

***Helico*** *(Ma)* sraŭbforma kurblinio; helica aparato iriganta ŝipojn
***Heliko*** *(Zo)* molusko (*Helis*) kun spirala konko
***Helikso*** *(Me)* orelkonka elstaro

***Hepatiko*** *(Bo)* genro de herboj (*Hepatica* el ranunkolacoj)
***Hepato*** *(Me)* grava organo de homkorpo sekrecianta galon

***Herbario*** kolektaĵo de sekigitaj plantoj
***Herbaro*** loko kovrita de herboj

***Hidalgo*** hispana nobelo
***Hidrargo*** *(Ke)* fluida metalo

***Himeneo*** *(Bo)* genro de tropikaj arboj (*Himenaea* el fabacoj)
***Himenio*** *(Bo)* sporoportanta tavolo de fungo
***Himeno*** *(Me)* virgulina membrano

***Hirudo*** *(Me)* sangosuĉa vermo uzata en medicino
***Hirundo*** *(Zo)* speco de migranta birdo (*Hirundo*)

***Hoko*** kurba metalpeco por ion pendigi, fiŝkapti ks
***Hokeo*** sportludo per kurbaj bastonoj

***Homaro*** la tuta homa gento
***Omaro*** *(Zo)* genro de dekpiedaj krustuloj (*Homarus*)

***Hordeo*** *(Bo)* grenspecio (*Hordeum* el poacoj)
***Hordeolo*** *(Me)* furunketo ĉe la rando de palpebro
***Hordo*** tribo el nomada popolo; malbonfara bando

***Horo*** dudekkvarona parto de la tago
***Ĥoro*** koruso
***Koro*** *(Me)* la centra organo de sangocirkula sistemo

## Mi gajnis milionojn en esperanto-loterio!!!!

«Bonŝance ke mi estis ricevinta ĉi anoncon en esperanto, ĉar, bedaŭrinde, mi ne scipovas la anglan... Nu, nu, tamen io ne klaras - do, vidu, ĉe la adreso de la sendinto, ion mi ne komprenas»:
***BARCLARYS Ligo Lotto OFICEJO, Manchester stadio, KAJ MAN*** (kial ne ***KROK ODIL***?) ***URBO Football Club, ORO Profitoj INTERNACIA loterio ANTAŬENIGO ... ...*** Laŭŝajne ankaŭ tiuj ne havas, kiel mi, tro klarajn ideojn en la kapo. Sed, tamen, mirinde! temas pri la Internacia Loterio Antaŭenigo! Signifoplena titolo! Kaj ĉie, kie bezonate, aperas la ĉapelitaj literoj, certe ankaŭ ili uzas la programon "EK".
Sed ni vidu la plej interesan parton, nome kiel mi sukcesis gajni la monpremion!
***Ni plezure informas vin pri la rezulto de la Loterio Gajnantoj Internacia Programoj tenis je la 11a de marto, 2012. Via retpoŝta adreso ligita bileton N° 27522465896-6453 kun seria N° 3772-554 tiris bonŝanca nombroj 7-14-18-23-31-45 kiu venkis en la 2a kategorio, vi do estis aprobita por bulo sumo salajro de £ 5,000,000.00 (Kvin Million Granda brita Pounds Sterling).*** Iom da ĥaoso, eble ili vizitis nur la unua-gradan kurson de Esperanto, eble la instruisto ne estis tro kompetenta: mi ĉiam asertas, ke tre gravas la lerteco de instruanto, alimaniere oni ĉiam havos problemojn ĉe la pluraj gramatikaj tiklaĵoj, kio malhelpas glatan interkompreniĝon. Sed ni antaŭeniru!
***CONGRATULATIONS!***
Ja, jen ankoraŭa manko en ilia lernado! Denove en la angla! Malgraŭ ke simplas ties traduko. Post kromaj klarigoj pri sekurecaj protokoloj kaj pri elektomaniero de partoprenantoj, el kiuj fine oni lotumis la ununuran gajninton (la koncerna sistemo nomiĝas 'Balot-Sistemo' kaj la konkurantoj konsistis el nur... 25 milionoj da retumantoj!!!), post informo ke tiu ĉi *promocional* programo okazas ĉiujare en Anglio (el tio ĉi mi komprenas, ke ili ne estas Land-uj-emuloj...) patronita de "arsenalo KAJ MAN urbo Football Club", fine oni petas mian rajtigon por transigo de "viaj *winnings* fundo en viajn instrukciojn" (nu, tre bone la uzo de tiu "n", ĉu ne?). Lasta rekomendo, la akceptorespondo devas atingi ilin ne post pli ol unu monato. Salutis kaj dankis pro partopreno la Enreta Kunordiganto *Ro Mark Parker*. Ne estis ankoraŭ la 1ª de aprilo, do nenia "aprila fiŝo" (*pri ĝi bv. legi je paĝo 2-a*), temis pri 'nuda kaj kruda' trompaĵo, nura diferenco kompare kun la aliaj ofte troveblaj inter la alvenintaj mesaĝoj, estas, ke ĝi estis skribita en esperanto. Tiaĵojn bonŝance nur malofte mi ricevas, danke al kvalita komputila barilo, sed ordinare tiuj mesaĝoj anglumas: kion povus tio signifi? Unue, ke oni provas paŝti sin en la esperantista kamparo, kiun oni supozas esti sufiĉe ampleksa; due, ke esperanto plialtrangiĝis, ĉar ĝi estas meritanta eĉ atenton de trompemuloj, kiuj imag-taksas sufiĉe alta la nombron de la esperantistoj (nu, kelkaj povus fali en ilian kaptilon...); trie, ke certe oni ekspluatis la eblojn donitajn de la ekzistantaj aŭtomataj maŝin-tradukiloj.

## Respondoj al demandoj pri Triesto:

1) Komence ĝi estis titolita *Palazzo Cheba* (elp. Keba - Palaco 'Kaĝo') pro sia fasado, kiu elvokis, kun iom da fantazio, ian grandegan birdan kaĝon, iom pli poste *Palazzo Sipario* (elp. Sipàrio - teatra kurteno) ĉar - per sia vasteco - ĝi sukcesis kaŝi la malbelaĵojn de la malantaŭa malnovurba kvartalo, sed, fine, ankaŭ *Castel de Mandolato* (elp. Kastél de Mandolàto - Kastelo el Nugato). La unua versio tamen estas la plej populara, ankoraŭ nun uzata. Pri tiu palaco cirkulas ankaŭ la jena anekdoto, rilatanta la arkitekton *Giuseppe Bruni*. Tiu "nomumo" estis vaste konata tiam tra la tuta urbo, tiom ke normale, kiam oni parolis pri la Urbodomo, oni ĝin tutsimple nomis "*Palazzo Cheba*". Tiu 'titolo' brulmarkis la koron kaj menson de la arkitekto, kiu ne tiom toleris tian malrespektan mokadon kaj kiu, ĝuste tiukaŭze, suferis je nerva deprimo. Sed ni venu al la realaj faktoj: iun aŭgustan matenon de la 1877ª jaro, li eniris Kafejon Terĝesteo, en la samnoma galerio situanta en Placo de Borso, kie, en tiu momento, troviĝis ankaŭ la komunumestro kavaliro *D'Angeli*, direktoro de Borso *Ignazio Brühl* kaj aliaj du aŭ tri gravaj triestaj komercistoj. Kiam Bruni estis proksima al la grupeto, la komunum-estro, varmridete, ekkriis: "Ha, jen ĉi tie nia...", sed li ne sukcesis finparoli, ke, laŭte kaj ĝoje kaj ĥore, la aliaj aldonis: "Arkitekto Chebat!". Sekvis silento glaciiga: oni ne sciis, ĉu ridi, ĉu honti, ĉu kaŝi sin ie. Morte pala, sen vortumi ion ajn, la arkitekto turniĝis kaj eliris. Kav. *D'Angeli* ĵetis rigardon furiozan al la kulpuloj, turnis sin kaj sen nenia aldono, pafis sin for el la kafejo. Arkitekto *Giuseppe Bruni* hejmiĝis, fermis sin en la saloneto, eltirkestigis revolveron kaj sinmortigis. Estis la 18ª de aŭgusto 1877, du jarojn post la finkonstruo de la triesta Urbodomo.
2) Temas pri la 'Fontano de la kvar kontinentoj', verko de arkitekto Mazzoleni el *Bergamo* (1751). La fontanon karakterizas diversaj elementoj, kiaj konkoj, delfenoj, rokoj kaj kestoj, bareloj kaj varpakoj. Alegoriaj figuroj de Riveroj verŝas el siaj ĵaroj akvon en la malsuprajn konkojn, akvon kiu poste falas en pli subajn basenetojn. Alte, staras la anĝel-forma Famo kun disetenditaj flugiloj super la juna figuro de Triesto, kuŝanta sur karsta rokaro kaj ĉirkaŭata per bareloj, kotonaj pakoj kaj ŝnuraro: ĉio ĉi simbolas la prosperon de la urbo, vaste disfamiĝanta tra la mondo. Kaj la mondon reprezentas 4 statuoj: ĉevalo por Eŭropo, kamelo por Azio, leono por Afriko kaj krokodilo por Ameriko. Aŭstralio forestas, ĉar tiuepoke ĝi ne estis ankoraŭ malkovrita.

---

Kiel ajn, tamen, oni ĉiam estu tre atentema, malfidu je tiaj mesaĝoj, provizu propran komputilon per tre grandpova kontraŭvirusa programo kaj - kiel fojfoje okazas al mi - ne alklaku, pro misa fuŝ-movo de la muso, iun allogilon, kiu povus kaŭzi neimageblajn domaĝojn ne nur al via komputilo, sed, pli tragike, eĉ al via banka konto!

# Tie kaj tie pluketante...




**FELIĈAN NASKIĜTAGON**
**deziras la aŭtomarko MINI...**

... al Esperanto okaze de la 125-a datreveno de ties surmondiĝo. La prestiĝa aŭtoentrepreno BMW eldonis gazetaran komunikon pri tio, krom en la germana, ankaŭ en Esperanto: https://www.press.bmwgroup.com/pressclub/p/de/download.html?textId=154803&textAttachmentId=189700 en elŝutebla pdf-formato.
Admiru la supran interesan foton en la plurlingva gazetara komuniko de la fabriko BMW!

*laŭ Esperantoland; Fonto: Ret-Eventoj*

## Loga programo en la franca kastelo Greziljono

Kio en julio kaj aŭgusto?
La aktivaĵoj de 4 semajnoj estas dediĉitaj al diversaj temoj:
- Hobioj artistaj de ĉiu tipo: 21 - 28 julio, vd. gresillon.org/s1
- Alternativa semajno kun verd-politika seminario: 28 julio - 4 aŭgusto, vd. gresillon.org/s2
- Ekskursoj al Luar-kasteloj posttagmeze: 4 - 11 aŭgusto, vd. gresillon.org/s3
- Pupteatra festivalo kaj gitaro por infanoj kaj familioj: 11 - 20 aŭgusto, vd. gresillon.org/s4

Vidu resumon de la somera programo en gresillon.org/somero.
Por ricevi letere la programon, sendu vian poŝtadreson aŭ ajnan demandon al:
kastelo@gresillon.org, bertox@free.fr

---

Daŭrigo de paĝo 3-a

● Prof. D-ro Gerhard F. STRASSER, Pennsylvania State University, Ludwig-Maximilian-Universitato, Munkeno.
La prelegoj aperos libroforme en volumo akompananta la ekspozicion.
Aliĝoj okazu jene:
1. por la solena malfermo: veranstaltungen@bsb-muenchen.de;
2. por la simpozio: baes.sekretariat@bsb-muenchen.de.

En la reto samtempe okazos virtuala ekspozicio.
Detaloj en la germana kaj en Esperanto: http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M562baccbf1d.0.html
Detaloj en la angla: http://www.bsb-muenchen.de/Detailed-information.403+M55ef4ef2898.0.html

| Junia Programo | |
|---|---|
| 1 vendredo | **20h00** - Fotoj de triestanoj kaj ne, en la lastjaraj eventoj |
| **5** mardo | **17h00** - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| **8** vendredo | **20h00** - Amika kunestado |
| **12** mardo | **17h00** - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| **15** vendredo | **20h00** - Triesta dialekto' - konversacio kun Ennio Gerolini |
| **19** mardo | **18h00** - Somera Festo |

| Septembra Programo | |
|---|---|
| 7 vendredo | **20h00** - Bonvenon! Kiel vi pasigis la someran tempon? |
| **11** mardo | **17h00** - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |
| **14** vendredo | **20h00** - Niaj estontaj programoj |
| **18** mardo | **17h00** - Unua- kaj dua-gradaj kursoj |

## *Bolonja Esperanto-Grupo "Achille Tellini 1912" festas sian 100-jariĝon!*

**Programo**
**Vendrede la 1-an de junio 2012**
17h00: inaŭguro de foto-dokumenta ekspozicio pri "Unu jarcento de Esperanto-historio en Bolonjo" - ĉe la grupa sidejo, via Avesella 16.
21h00: videofilmoj pri la vivo de GEB.

**Sabate la 2-an de junio**:
10h00: Konferenca Salono en Kvartalo *Santo Stefano* (via S. Stefano 119) - Kunveno
13h00: komuna tagmanĝo en loka restoracio
15h30: promenado tra la historia centro, vizito de la Muzeo pri Bolonja historio.

**Dimanĉe la 3-an de junio:**
09h00: aŭtobusa ekskurso al *Riolunato*, kie, komence de la pasinta jarcento, aktivis Esperanto-Centro fondita de grafo Gallois. Renkontiĝo ĉe la urbodomo kun lokaj aŭtoritatuloj. Tagmanĝo en tipa restoracio.
18h00 - alveno en Bolonjo.

Aliĝoj kaj informoj riceveblas de:
*amadeimario@iperbole.bologna.it*

## Atentigo!

Ekde la 20-a de junio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. Vin atingos kompreneble la TEA-Bulteno (denove kun malfruo, pro feriado de la redaktanto!). Sed jam nun bv. noti ĉi rendevuon: **dimanĉon la 22an de julio, ekde la 18a horo, ĉiuj ĉe Anita** - ŝi varme nin invitas por kunestado plezuriga, amika, amuziga kaj esperant-tema.
Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj unua rendevuo ĉe TEA-sidejo vendrede la 7an de septembro!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo**: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
**Grupa ttt-ejo**://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina - www.esperantotrieste.it
**Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
**Poŝtĉekkonto** N° 10834349